



BONA ESPERO



Cussonia paniculata



ISSN: 0006-7024

Porkomencanta numero

Volume 1987/24

Numero 3

BONA ESPERO

Organo de la Sudaŝrika Esperanto-Asocio (SEA).

Kontribuaĵojn, prefere maŝinskribitajn, oni sendu al la koncerna redaktoro.

Decembra (junula numero)	*Simon Donnelly 15 Garfield Road 7700 Claremont
Marta (kultura numero)	*Edwin de Kock Poŝtfako 143 0009 Bon Accord
Junia (ĝenerala numero)	*Cobus Zeelie Poŝtfako 12271 6006 Centrahill Port Elizabeth
Septembra (porkomencanta)	*Japie Spoelstra k Johan de Klerk Poŝtfako 20185 2522 Noordbrug Potchefstroom

La personoj kies nomoj aperas kun la kontribuaĵoj respondecas pri ili kaj pri iliaj enhavoj. La revuo iras senpage al membroj de la Asocio. Interŝanĝe por aliaj revuoj, ĝi estas havebla de la Kasisto. Nemembroj povas aboni, skribante rekte al la Kasisto: S-ro C Beckford, Poŝtfako 1227, Cape Town, 8000 Sudaŝriko. Interŝanĝaj revuoj estas sendendaj al Cobus Zeelie (adreso ĉi-supre)

SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO (SEA)

Ĝenerala adreso de la asocio: Bronkhorststrato 75, Groenkloof Pretorio, 0181, Sudaŝriko.

Estraro:

Prezidanto: X X	* <u>Edwin de Kock, Poŝtfako 143, 0009 Bon Accord, Sud-Afriko.</u> Tel - Hejme (012) 50621 Dejore (011) 8025290
Vic-prezidanto X	* <u>Axel von Blottnitz, Poŝtfako 785441, 2146 Sandton, Sud-Afriko.</u> Tel - Hejme (011) 272363 Dejore (011) 8025290
<u>Sekretario</u>	* <u>Oscar Sher, Bronkhorststrato 75, 0181 Groenkloof, Sud-Afriko.</u> Tel - Hejme (012) 468767 Dejore (012) 2983061
Kasisto	* <u>Colin Beckford, Poŝtfako 1227, 8000 Cape Town, Sud-Afriko.</u> Tel - Hejme (021) 770588 Dejore (021) 236133
Aliaj komitatanoj	* Henri Appel (Alberton - Transvalo) Simon Donnelly (Claremont - Kablando) <u>Adèle Fouché (Port Elizabeth - Kablando)</u> Johan Hammes (Pretria - Transvalo) Felix Woolf (Kaburbo - Kablando) Cobus Zeelie (Port Elizabeth - Kablando)

Estimataj Gelegantoj,

La redaktoro de la antaŭa numero de BONA ESPERO nomis ĉi tiun numeron "eduk(ist)a". Li parte pravis, sed ne tute. En la senco, ke ĉiuj Esperantistoj ĉiam intencas edukadon: jes. Sed nia motivo estas nur doni al vi interesajn legaĵojn; aparte al komencantoj. Do, la lingvo, stilo, ktp. devus esti facilaj. Ni ne intence uzis nur vortojn el la vortlistoj, kiujn uzas Kontakto por faciligi siajn artikolojn, sed eble vi trovos, ke ko-no de la vortoj el tiu vortlisto jam malfermos 90% de la artikoloj por vi. Pli ĝusta nomo por ĉi tiu numero do estus "porkomencanta" revuo.

Kvankam BONA ESPERO estas "movada revuo", ni ne deziras nur "movadajn" artikolojn por venontaj numeroj. Ĉiu ajn pri la mondo, Afriko, la Lingvo, naturo, novaĵoj, ktp. bonvenigos.

En plejmultaj Esperantaj gazetoj speguliĝas senco de amo kaj respekto por la naturo kaj ekologio. Ĉe la kongreso de la SEA apud Port Elizabeth dum aprilo, tiu sento ankaŭ estis videbla, se oni juĝas je la granda nombro da kongresanoj, kiuj kune entreprenis ekskurson en la arbustaron sub la gvido de Axel von Blottnitz. Oni preskaŭ povas imagi, ke ĉi tiu sento estas parto de la "interna ideo"! Viaj redaktoroj ambaŭ avide ŝatas la naturon, kiel vi povas diveni el la frontpaĝa ilustraĵo de folio de la sudafrika "arbo de la jaro", *Cussonia paniculata*.

Pro la fakto, ke ni celas ankaŭ al komencantoj, bonvolu pardoni nin, ke ni uzis anglan artikolon por ekspliki la uzon de certaj frazoj. Ĉar kelkaj el niaj legantoj ne konas la anglan, tiu artikolo povus esti nelegebla por ili. Sed ni opinias, ke la jaroj de sperteco en la instruo de Esperanto de la verkisto, Felix Woolf, rajtigas la aferon.

Ĝis la oktobra numero de 1988!

Japie Spoelstra kaj Johan de Klerk

ENHAVO

Trilingva artikolo	Felix Woolf	4
Jarkunveno de la SEA		6
Spiro de drako	Johan de Klerk	7
EL LA NATURO:		
La specio <i>Cussonia</i>	Axel von Blottnitz	8
Fama persono el la historio de la vilaĝo Bethulie	Johan de Klerk	10
A Few Grammatical notes	Felix Woolf	12
EL LA GAZETARO		
Esperanto: Bjalistoko: Manifestacio por interhoma solidareco		15
Monato: Bilet-banditoj		18
Fokuso: Reen al sorobano		19
Fokuso: Diversaj opinioj		19
Transmara vizito per la delegitoj	Japie Spoelstra	20
Judaj Festoj: Purim	Oskaro Sber	23
Esperanto: 1887-1987		24
Antaupaĝa ilustraĵo: el <i>Trees of Southern Africa</i> , KC Palgrave		

TRILINGVA ARTIKOLO

Felix Woolf

I walked up the street, gazing about, until near the market house I met a boy with bread. I had made many a meal on bread and asked him where he got it. I then went to the baker's and asked for biscuit, such as we had in Boston. I asked for a three-penny loaf and was told that they had none such.


Not knowing the difference in the value of money and the greater advantage in cost, I bade him give me three-penny worth of any sort. He gave me three puffy rolls. I was surprised at the quantity but took it and walked off with a roll under each arm. Thus I walked up Market street as far as Fourth Street, passing by the house of Mr Read, my future wife's father. She, standing at the door, saw me and thought I made a most awkward appearance, as I certainly did.

Ek het straat-op geloop en rondkyk tot naby die markhuis, toe ek 'n seun met brood raakloop. Ek het al dikwels 'n ete van brood gemaak, en vra hom toe waar hy dit gekry het. Ek het toe na die bakkerij gegaan en gevra vir beskuitjies soos dié wat ons in Boston gehad het. Ek vra toe vir 'n brood van drie pennies maar word vertel dat hulle nie sulkes het nie.

Onbewus van die verskil in uitruilwaarde van geld en die groter geldvoordeel, vra ek hom om my drie pennies s'n van enige soort te gee. Hy gee my toe drie pof-broodjies. Ek was verbaas oor die hoeveelheid maar het dit geneem en loop toe weg, met 'n broodjie onder elke arm. So loop ek toe in Markstraat op tot by Vierdestraat, verby die huis van meneer Read, my toekomstige vrou se vader. Sy het by die deur gestaan en het my gesien en het gedink dat ek 'n baie lompe vertoning gemaak het, soos ongetwyfeld die geval was.

Mi promenis laŭlonge de la strato, rondrigardante, ĝis proksime de la foir-placo mi renkontis knabon kun pano. Mi jam multfoje satmanĝis panon kaj demandis al li kie li ĝin aĉetis. Mi tiam iris al la bakisto kaj petis biskviton, similan al tiu en Bostono. Mi petis tripencan bulon kaj informiĝis, ke ili ne havas tian.

Ne sciante la valut-diferencon kaj la pli grandan monavantaĝon, mi petis de li tripencan varon de iu ajn speco. Li donis al mi tri pufitajn buletojn. La kvanto surprizis min sed mi akceptis ĝin kaj formarĝis kun po unu bulo sub ĉiu brako. Tiel mi marĝis laŭ Foirstrato ĝis Kvarastrato, preterpasante la domon de s-ro Read, la patro de mia estonta edzino. Starante ĉe la pordo, ŝi vidis min kaj opiniis, ke mi malkonvene montriĝis, kaj tiel fakte estis.



„Ĝi estas la ununura,
kiu konfesas,
ke ĝi kostas pli ol ĝi
valoras!”

Esperantaj sonbendoj

Colin Beckford aĉetis sonkasedon "LA ESPERO" en Pekino. Li opiniis ĝin bonega, kaj do mendis 6 pluajn de UEA. Ĝi estas havebla de li je kosto de E26-00.

JARKUNVENO DE LA SUD-AFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

La 25a jarkunveno de la Asocio okazos dimanĉon la 1988-03-20an je la 14h30 ĉe la hejmo de ges-roj HW Appel, 8 St Michael Road, New Redruth, Alberton (tel (011)869.4031).

TAGORDO

1. Antaŭa protokolo kaj traktado de aferoj estiĝintaj el ĝi.
2. Raporto de la Prezidanto.
3. Raporto de la sekretario kaj pritraktado de korespondadoj.
4. Raporto de la kasisto.
5. Elekto de nova estraro.
6. Sango de la nomo de la Asocio - Klarigo aperis sur paĝoj 1-3 de Bona Espero, volumo 1987/24, numero 1.

Mi petas, ke oni sendu al mi, kiel eble plej frue, nomojn de membroj, kiujn oni deziras proponi por elekto al la nova Estraro, kun ilia konsento aĝi se elektitaj. La nuna komitatanoj estas petataj informi min, ĉu aŭ ne ili konsentas al refoja elekto por plua jaro.

Membroj, kiuj ne povas ĉeesti la kunvenon, estas petataj ensendi siajn komentojn, opiniojn, ktp., al mi por ke oni povu pritrakti ilin sub la ĉi-supra ero 3. Mi speciale deziras ricevi raportajn pri Esperanto-agado de la diversaj grupoj tra la lando.

O Sher
Sekretario

SPIRO DE DRAKO?

JHdK

La plej grandan subteran lagon monde oni malkovris antaŭ ne-longe. Ĝis tiam, la Lost Sea (Perdita maro) en la Craighead [Kreĵhed] kavernoj en Tennessee, Usono, estis la plej granda subtera lago ie ajn konata.

Dum la pasinta julio, anoj de la sudafrika speleologia asocio vizitis grandan subteran lagon en la nordaj regionoj de Namibio kaj malkovris la grandecon kaj belecon de ĉi tiu subtera mirindaĵo.

La plafono de la lago estas 30m alta kaj la akvo estas klara kiel kristalo. Kontraŭ la 1,8ha de la Perdita maro, ĉi tiu lago mezuras 2,0ha kaj troviĝas 60m subtere.

La norda parto de Namibio estas ebena, arbokovrita lando. Meze de la arboj, apud la urbeto Tsumeb, troviĝas inter rokoj mal-granda truo, kiu formas la enirejon al la lago. Frumatene, oni povas vidi vaporetan ĉe la enirejo, kvazaŭ blovatan el la tero. Geologo, ano de la speleologia asocio, vidante ĝin, esploris la fenomenon. Tiel, li malkovris ĉi tiun grandan lagon kaj, pro la vaporeto oni nomis ĝin Draakasengrot (Drakspirtruo).

Vizitantoj miris pri la lago. Ankaŭ Journalisto, kiu eniris la kavernon, poste raportis: "Mi rigardas supren kaj vidas homojn, kiuj glitas malsupren laŭ ŝnuroj kiel araneoj. Voĉoj eĥas en la kavernon. Mi sentas atmosferon de katedralo...."



Pro la malproksimeco kaj danĝero de Drakspirtruo, oni ĉi-momente feliĉe decidas ne permesi vojaĝantojn viziti ĉi tiun belan naturkreaĵon.

<><><><><><><><><><><><><><>

LA SPECIO CUSSONIA

Axel von Blottnitz

Ciun jaron oni festas en Sudafriko arbotagon la duan vendredon en Aŭgusto. Ciun jaron (por la tuta jaro) oni deklaras unu tipon de arbo la "arbo de la jaro". Por 1987 ĝi estas la indiĝena genuso *Cussonia*, kiu troviĝas nur en Afriko. Naŭ specioj troviĝas en Sudafriko, kaj ili estas ĉiuj arboj.



Ili havas tre mirinde segmentitajn manformajn foliegojn kun tre longaj petioloj - verŝajne la plej interesaj foliŝtukturoj en la plantregno. Pro la kupolforma krono kaj nuda trunko, la Afrikansa nomo estas *Kiepersol*, devenanta de la portugala *quitasol* (=ombrelo). La ligno estas tre mola (seke 300-500 kg/m³). Subtere troviĝas grandaj tuberoj, dum la radikoj estas karnecaj.

Oni ofte plantas *Cussonia*-arbojn en ĝardenoj. Antaŭ la veno de la grandega infloresko (tre komplikaj kunmetitaj umbel- kaj spikformoj) la tuta arbo aŭ branĉo forĵetas ĉiujn foliojn. Tiel ĝi staras kelkajn monatojn antaŭ aperas la infloresko. Dum tiu periodo, se somere, kelkaj ĝardenistoj jam forhakis sian arbon opiniinte, ke ĝi mortis.

Al la sama familio, *Araliaceae*, apartenas entute 55 genusoj,

inter alie la bonkonataj *Panax* (=ginsengo), *Eleutherococcus* (kiun la So-vetia Departemento por Sporto utiligas por igi sportistojn pli eltenpovaj), *Hedera* (la komuna hedero, kiu grimpas sur muroj), *Schefflera*, *Fatsia*, *Brasaia*, *Tetrapanax* kaj *Tupidanthus* (endomaj kaj ĝardenaj ornamplantoj).

Grandan impreson faris al mi kiam armeo da raŭpoj tute formangiĝis la foliaron de granda *Cussonia*-arbo en kelkaj tagoj apud nia biendomo en la Orienta Kabo. La Kosaa nomo, kiel ankaŭ la Zulua, estas *Umsonge*.

La arbo de la jaro por

1988: la genuso *Olea*
1989: *Calodendrum capense*
1990: la genuso *Quercus*
1991: la genuso *Trichilia*
1992: la genuso *Populus*

La Dendrologia Asocio liveras sildojn kun arbnomoj, kiujn oni povas ŝraŭbi al la trunko de arboj kun nerustaj ŝraŭboj. Ili, kune kun la ŝraŭboj, kostas po R4 (iomete plikostaj kiam ankaŭ aperas la Zulua nomo) akireblaj tra Axel von Blottnitz.

El Usono ni ricevis la jenan leteron:

Kara Amik(ino):

Se vi estas unu el la izolitaj uzantoj de Esperanto, "SIMPLA VIVADO..." povas esti utila perioda edukilo kaj ofta kontaktejo. Se vi deziras ricevi la cirkuleron, bonvolu sciigi al ni vian deziron, kaj doni al ni viajn nomon kaj adreson. Unufoja provekzemplero ankaŭ estas ebla. La organizo kiu administras la cirkuleron estas PLI OL UNU, PO Box 805, Springfield, VA 22150 Usono (USA).

Bondezirojn!

FAMA PERSONO EL LA HISTORIO DE LA VILAGO BETHULIE

JHdK

Malgranda vilaĝo troviĝas en la suda parto de la Orang-Liberŝtato, nome Bethulie. Jen mallonga rakonto pri fama persono, kiu loĝis en la ĉirkaŭaĵo de ĉi tiu vilaĝo. Kiu estas la famulo? Louw Wepener, kiu vivis dum la pasinta jarcento kaj farmis sur bieno proksima al Bethulie.

La gepatroj de Wepener loĝis en Stokholmo, Svedujo. Ili venis al la Kabo de Bona Espero pro la sanstato de la patro kaj hejmgigis sin en la regiono de Graaff-Reinet. En 1850 Louw Wepener vojaĝis al la Orang-rivero kaj aĉetis farmon apud la hodiaŭa Aliwal-Noord. Li sukcesis kiel farmisto. Dum la sekvantaj jaroj li riĉiĝis.


Wepener estis ne nur strebanta farmisto, sed ankaŭ kuraĝa soldato. Dum 1858 la unua milito inter la Orang-Liberŝtato kaj Basutulando eksplodis. Ĉar li loĝis en la Kabkolonio, li ne estis permesita helpi la burĝojn de la Liberŝtato. Do, li decidis aĉeti farmon en la Liberŝtato kaj vivi sur la farmo. Tiumaniere, li opiniis, ke li fariĝos soldato de la Liberŝtato. Li migris trans la Orang-rivero al la regiono de Bethulie kaj aĉetis la farmon Constantia [Konstanŝia] nur kvin kilometrojn de la vilaĝo.

La vilaĝanoj amis Louw Wepener kaj lian familion. Sur sia farmo li konstruis belegan domon. Dimanĉe, gastoj vizitis ilin por admiri la fortikan domon. Baldaŭ li fariĝis la gvidanto de la homoj. En 1865 okazis la dua milito inter la Orang-Liberŝtato kaj Basutulando. Oni elektis Wepener kiel komandanto de la distrikto. Li kaj liaj soldatoj kaptis kelkajn fortresojn - Moperi, Mogalieshoek [Moĥalishuk] (angulo de Moĥali), Die Hel (La Inferno) kaj Tandjiesberg [Tajnkisberĥ] (Monto de dentoj). Fine ili atingis la plej gravan fortreson - Thaba Bosigo, (la nokta monto). La gvidanto de la Basutulandanoj, Mosjesj [Moŝeŝ] loĝis tie. Thaba Bosigo estas kruta monto kaj

aspektas kiel kastelo.

Mosjesj loĝis sur la montopinto. Ĉirkaŭ la montopinto oni trovis perpendiklajn klifojn kun nur unu aŭ du trairejoj. La batalo daŭris longe, sed ... la Basutulandanoj venkis. Wepener mortis kaj la soldatoj panike forkuris. Poste oni trovis la kadavron de Wepener sur la monto kaj portis ĝin hejmen. Li estis enterigita sur sia farmo. Dum 1941 oni konstruis monumenton sur monteto ĉe la farmo. Sur la monumento oni legas: Fidela ĝis la morto.

BIBLIOTEKO ANNO 1985



A FEW GRAMMATICAL NOTES

Felix Woolf

1. When THAT is used relating to TIME, its specific meaning must be rendered in Esperanto, i.e., WHEN or DURING or IN WHICH: On the night THAT he went away EN KIU li foriris; the whole time THAT (during which) we were with you . . . DUM ni estis kun vi.
2. When COULD HAVE conveys the sense of ALMOST, or WAS NEAR TO or NEARLY, it is PRESKAŬ: I COULD HAVE wept for joy - mi PRESKAŬ ploris pro ĝojo.
3. NEITHER OF is AMBAŬ NE or NENIU EL: NEITHER OF you will go - vi AMBAŬ NE iros, or NENIU EL vi iros. When NEITHER (NOT EITHER) is used as a conjunction, translate by NEK . . . NEK . . . She will not sing, NEITHER will she talk (she will NEITHER talk NOR sing) - ŝi NEK kantos, NEK parolos. When a negative is used with EITHER (NEITHER), we have NEK: NOR you EITHER - NEK vi ankaŭ; she never smiled, EITHER at you or at me - ŝi neniam ridetis, NEK je vi, NEK je mi.
4. HARDLY, meaning ALMOST COULD NOT or JUST ABLE TO is PRESKAŬ NE or APENAŬ: She was so tired, she could hardly stand . . . ŝi PRESKAŬ ne povis stari; he had HARDLY opened the window when the bird flew in - APENAŬ li malfermis la fenestron, la birdo enflugis. N.B. The conjunction "when" here is not translated.
5. The phrase I CAN'T HELP . . . can be translated in three ways but be careful to choose the one most suitable for the occasion: I CAN'T HELP LAUGHING - mi NE POVAS NE ridi, mi NE POVAS EVITI ridi, mi NE POVAS DETENI MIN ridi.
6. A great many writers invariably use -US after KVAZAŬ, but the ending used should be decided by the sense of the text. Zamenhof often used the indicative: Ŝajnas al mi KVAZAŬ mi mangAS konfitaĵon. Vi aspektas KVAZAŬ vi vidIS fantomon.
7. For conciseness, emphasis or perhaps consideration of space and in telegrams a clause related to the main clause can very often be rendered in one word by converting its verb to a participle, active or passive, with the adverbial ending. After he had finished singing, the actor left the stage - KANTINTE, la aktoro forlasis la scenejon; when it was about to be washed, the dog disappeared - LAVOTE, la hundo malaperis; one likes to be seated while one eats - MANGANTE, oni preferas sidi. So also, phrases beginning with AS, LIKE, IN WITH followed by a noun may be rendered adverbially: As a friend - amike; LIKE a father - patre; IN the evening - vespere; WITH a smile - ridete.
8. As a phrase containing an unrelated participle is not used in Esperanto (the Latin 'ablative absolute'), a subordinate clause or other form is used instead. The wine being drunk, I

went home, cannot be 'La vino TRINKITE mi iris hejmen', as it refers to the subject MI! Rather: TRINKINTE la vinon . . . or, Kiam la vino estis TRINKITA . . . or, post kiam ni TRINKIS la vinon . . . , etc. Her husband having died, she sold the house - CAR (or PRO TIO, KE or POST KIAM) ŝia edzo mortis . . .

9. There is a fine difference between MULTAJ and MULTE DA, and KELKAJ and KELKE DA. MULTAJ homoj denotes many people scattered all over the place, anywhere, everywhere, while MULTE DA HOMOJ signifies a concentration in one place at the time referred to. The same applies to KELKAJ and KELKE DA. These usages are, however, flexible as in: I had a few guests - mi havis KELKAJN gastojn.
10. In superlatives such as the second-longest bridge, the fourth-largest city, add -loke to the numeral or turn the numeral into an adverb: La DUALOKE plej longa ponto; la KVARE plej granda urbo.
11. Note the following: The details are too clear FOR ME TO GO WRONG (so clear that I cannot . . .) - la detaloj estas tro klaraj OL KE MI ERARU, or, . . . tiel KLARAJ KE MI NE POVUS ERARI; they were TOO BUSY TO BE INTERESTED - . . . TIEL OKUPITAJ, KE ILI NE POVIS INTERESIGI.
12. To convey a FEW IN EXCESS OF a certain number, add KELKAJ to the number: Just over 20 people were present - ĉeestis dudekKELKAJ homoj; I have over 100 books on that subject - mi havas dekKELKAJN librojn pri tiu temo. A teenager is DEKSELJARULO.
13. In a sentence such as: He is THE FIRST TO CLIMB that mountain, IS is not translated and the infinitive TO CLIMB becomes a finite verb: Li LA UNUA GRIMPIS TIUN MONTON.
14. If ALIA is accompanied by a negative, one may use either OL or KROM, but care must be taken not to use the accusative after KROM: Li ne scias alian lingvon OL sian propran, or KROM sia propra. Zamenhof warned that using the derivatives ALIU, ALIE, ALIES (imitative correlative forms) was 'against the rules'. Of these perhaps ALIES is permissible: Ies perdo, alies gajno.
15. The problem of the names of women in Esperanto has been solved by converting the masculine form in -o to the feminine form in -a, a device used by Zamenhof. But as this appears contrary to the rule whereby all nouns end in -o, the feminine form in -a is regarded as an adjective related to the omitted word INO. So we have: Johano - Johana (ino); Julio - Julia (ino); Simono - Simona (ino). In women's names where no masculine form exists, we 'imagine' that such exist: Helena, Laura, Rebeka.
16. Do not attach any unnecessary affix to a root merely for emphasis when the sense is clear without it: La kasisto de nia societo estas sinjorino Blanko. KasistINO might even imply that the cashier has to be a female and that there is also a male

cashier! Many writers overdo the use of some affixes such as ad, -aĉ -eg, -et: Li laborADas la tutan tagon. "Tutan tagon" makes the -ad unnecessary. Similarly: La malgranda nigra hundETO apartenas al mi. "Malgranda" tells the story.

17. Affixes, either by themselves or with other affixes from independent words in Esperanto: Ĉi tie disiĝas niaj vojoj. Si estas mia eksa fianĉo. Ili agas male al siaj vortoj. Ni trovis nin en vere aĉa situacio. Kapitano estas estro de la ŝipo. La kato (not katINO) portas siajn idojn per la buŝo. A few examples of the above are: Aĉulo, aĉulino, aĉega, anigi, anigi, animo, areto, arigi, arigi, disigi, diseco, diserigi, ereto, estreco, estrema, estrino, estraro, estrarano, estraraneco, etulo, etularo, eksigi, eksiginda, fiulo, fieco, ilaro, idaro, ideto, ilarejo, inaĉo, indeco, malindeco, ulaĉo, uleto, ktp., ktp. These are just a few examples of the almost unlimited number of words that may be formed in this manner to meet the requirements of any situation and with great accuracy without the need to consult a dictionary. It is hoped those shown will whet one's appetite to create one's own words as the occasion arises.

18. Grammatical endings are added only to the last member of a combined ordinal number: 56th. - kvindek-sesa, not kvindeka-sesa; the 123rd. - la cent-dudek-tria not centa-deduka-tria. (There are no hyphens in the cardinal numbers). The hyphen must be retained in using a number as an adverb from 10 to 19: 13thly. - dek-trie; 18thly. -dek-oke. (But okdeke, no hyphen). Por pendigi ŝteliston, UNUE kaptu lin (first things first).

19. When expressing how many times something is done or takes place, etc., be careful not to confuse -OBLE with -FOJE: hieraŭ mi mangis triOBLE conveys that I ate three times as much as I usually do, while : Mi mangis triFOJE says that I ate three times - morning, afternoon and evening.

20. The suffix -OP indicates "at a time", is collective and is used only with numerals and words showing quantity: Ili eniris DUOPE - two at a time. Like -OBL it is used also with KELK-, MULT- and PLUR-: MULTOPE vojaĝi estas pli sekure ol UNUOPE. Unue mi lernis sola sed nun ni lernas KELKOPE.

21. A preposition joined as a prefix to a verb of motion is usually repeated after the verb: Nun ni ALvenas AL la plej grava demando. La blankuloj KUNekzistas KUN la flavuloj tute pace kaj amike.

22. There are various English translations for the preposition PER: Oni skribas PER plumo - WITH a pen. Li parolis PER telefono kun sia amiko - ON the telephone. Sendu la pakajon PER poŝto - BY post. Surdmutulo parolas PER la manoj - BY MEANS OF his hands.

EL LA GAZETARO

El Esperanto de septembro, 1987, p154:

BJALISTOKO: MANIFESTACIO POR INTERHOMA SOLIDARECO

Pli ol mil kongresanoj dediĉis sian ekskursotagon, la 29an de julio, al pilgrimiro al la naskiĝurbo de Zamenhof. En la eta parko en la urbocentro, kie staras bronza monumento al la iniciatinto de Esperanto, densa homomaso ĉeestis la subskriban ceremonion de la Fondo-Akto por la Bjalistoka Esperanto-Centro. Kaj poste, en subĉiela amfiteatro, okazis ceremonio dediĉita al la idealoj, kiuj inspiris tiun grandan humaniston dum lia tuta vivo.

Post enkondukaj vortoj kaj prezentoj, i.a. de la ĉeestantaj pola vicministro pri kulturo kaj la vojevodo kaj urbestro de Bjalistoko, parolado de d-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof bele difinis la idean enhavon de la programo. Parolante en la pola, kiun li ankoraŭ perfekte konas de sia infanaĝo, li substrekis la ligitecon de paco kun fundamentaj homaj rajtoj en la vasta homarana vizio de sia avo; kaj parolis kun espero pri la ŝanĝo en Bjalistoko mem, kie "anstataŭ ĉiuj doloraj kaŭzoj de malamo, kiujn li konis kaj kiuj inspiris lian humanismon, li trovas modernan urbon kie la homoj vivas en paco kaj interhoma solidareco".

La prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin, poste enkondukis la manifeston konotan kiel la Deklaron de Bjalistoko. Li parolis pri la survoja vizito de la esperantistoj al Treblinka, kie pereis centoj da miloj da homoj en la dummilita koncentrejo, kaj la ĉeno de kaŭzoj kondukanta de senscio tra timo kaj kruelo ĝis mortigado. "Dum cent jaroj esperantistoj laboris por rompi tiun ĉenon, sed ankoraŭ estas nur komenco. Pro tio, ke Esperanto ne sukcesis, homoj ankoraŭ mortas pro la samaj kialoj." Sekve la Alta Protektanto Roman Malinowski esprimis la esperon, ke la planata Bjalistoka Centro "servos al la forigo de la internacia

analfabetismo" en interhomaj rilatoj.

La Deklaro, aperigita sube, estis poste adoptita de la tuta Kongreso en la Solena Fermo. UEA prizorgas ĝian dissendon al registraroj k.s., sed ĝi ankaŭ indas je diskonigo inter aliaj porpacaj kaj humanismaj movadoj.

DEKLARO DE BĴALISTOKO

El la urbo Bjalistoko, naskiĝloko de la kreinto de Esperanto, Ludoviko Zamenhof, unu el la grandaj humanistaj figuroj de nia epoko, la partoprenantoj en la 72-a Unversala Kongreso de Esperanto sendas tiun ĉi deklaron al la ŝtatestroj kaj registraroj de la mondo okaze de la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo.

1. Unu el la plej grandaj kaĝzoj de malamikeco inter la diversaj landoj de la mondo estas manko de scio. Tiuj, kiuj ne konas unu la alian, facile fariĝas viktimoj de antaŭjuĝoj kaj miskomprenoj.

2. Kvankam la edukaj sistemoj de la diversaj landoj povas multon fari por kulturi en la mensoj de siaj lernantoj informitecon kaj malfermitecon al aliaj popoloj, ankoraŭ pli valoraj ol abstraktaj lecionoj estas rektaj kontaktoj.

3. Kvankam la gazetaro kaj aliaj komunikiloj povas helpi ĉiujn civitanojn informiĝi pri aliaj popoloj, senpera komunikado inter homoj el diversaj landoj estas la plej bona maniero forigi antaŭjuĝojn kaj firmigi la komprenigon.

4. La senpera kontakto postulas komunan lingvon. Se homoj parolas malsamajn lingvojn, ili ne povas senpere komunikiĝi. Kvankam lernado de aliaj naciaj lingvoj estas valora maniero transponti tiun dividon, la internacia lingvo Esperanto konsistigas aparte facilan kaj efikan metodon por atingi internacian

interkomprenigon je tutmonda skalo kaj ĝi estas plej bona enkondukilo al la lingvolernado.

5. Esperanto - pro sia simpleco, logiko kaj tuta strukturo - estas ne nur lingvo taŭga por ĝenerala lernado, kiel la dua lingvo por ĉiuj, sed tra cent jaroj da utiligo en ĉiuj sferoj de la homa vivo, ĝi fariĝis plene esprimiva kaj fleksebla kaj ĝiaj parolantoj troviĝas en perskaŭ ĉiuj landoj de la mondo.

6. La mondaj problemoj, kiuj bezonas pritrakton je tutmonda skalo, ĉiam plimultiĝas. La demandoj de ekonomia evoluigo, de malarmado, de malsato, de malsano, de analfabeteco, de mediprotektado, k.s. postulas komunan kaj egalecan aliron pere de rekta komunikado en komuna lingvo. Regado kaj solvado de tiuj problemoj povas efike okazi nur per plena partopreno de civitanoj je ĉiuj niveloj.

7. Tial ni rekomendas al ŝtatestroj, registaroj kaj kompetentaj aŭtoritatoj kaj instancoj de ĉiuj landoj utiligi Esperanton kiel studobjekton en lernejoj kaj ebligi rektajn homajn interŝanĝojn inter siaj ŝtatanoj kaj homoj el aliaj landoj pere de la Internacia Lingvo.

8. Ni firme kredas, ke el tiu rekta interŝanĝo ekestos pli klara interkomprenigo inter unuopaj homoj de ĉiuj landoj. Tio kondukos al redukto de streĉiteco, al pli granda malfermiteco inter la popoloj, kaj al pli paca kaj libera mondo.

Ni invitas ĉiujn homojn de bona volo, kiuj konsentas kun tiuj ĉi principoj, apogi tiun ĉi Deklaron kaj tiel sin dediĉi al antaŭenigo de interkomprenigo inter ĉiuj homoj de la mondo.

Bjalistoko, la 29-an de julio 1987.

.....

El **Monato** de septembro, 1987, p10.

BILET-BANDITOJ

Paŭlo Gubbins

Episkopo, parlamentano, juĝisto, eĉ polica inspektoro nombris lastatempe inter britoj, kiuj - laŭ ĉi-landaj fervojaj instancoj - veturis senbilete.

Tial, por malkuraĝigi senbiletulojn, fervojaj bilet-kontrolistoj en Londono preparis ruzon, kies sukceso mirigis eĉ la plej optimistan partopreninton.

Decidite estis embuski tutajn plentrajnadojn da pasaĝeroj por plejzorge kontroli ĉiun bileton. Dekoj da kontrolistoj invadis sang-stacidomon, kie pasaĝeroj, elvagoniĝinte el rapidtrajnoj, kutimis transiri kajon por envagoniĝi en subteran trajnon. La kontrolistoj tamen direktigis la rapidtrajnadojn al alia kajo tiel, ke vojaĝantoj, por atingi la atendantan subteran trajnon, estis devigitaj transiri la trakojn aŭ per tunelo aŭ per ponto, kaj tie staris armeo da kontrolistoj ekzamenontaj ĉiun bileton.

Eskapo ne eblis, kvankam iuj senbiletuloj sensukcese provis forkuri. Dum du tagoj, je la surprizo de la fervojistoj, la kontrolistoj rikoltis 4000 britajn pundojn per kromveturprezoj, kaj 200 homoj frontas nun al monpuno de ĝis 400 britaj pundoj aŭ ĝis ses monatoj en malliberejo.


Oni kalkulas, ke senbiletuloj kostas al la fervojo en la londona regiono tri elcentojn de l'tuta enspezo; tio signifas, ke oni perdas ĉiujare ĉirkaŭ 20 milionojn da britaj pundoj, kiuj sufiĉus por provizi la fervojon per 21 novaj vagonaroj aŭ por duobligi la stacidoman modernig-programon.

Jam aranĝitaj estas aliaj atakoj kontraŭ la bilet-banditoj: la fervojaj "serifoj" kompreneble silentas pri la detaloj de venontaj embuskoj.

El **Internacia Komputado**, (nun **Fokuso**)

REEN AL SOROBANO (JAPANIO)

En Japanio jam aperis ankaŭ tendenco reiri al la globa etlerneja kalkulilo, al sorobano. Per la disvastigo de la kalkuliloj la instruistoj rimarkis, ke la alproprigo de la matematika pensadmaniero ne egalas al alproprigo presi butonojn. Pro tio relative rapide revenas la pli ol 500-jara sorobano kaj en 1984 pli ol 30.000 specifaj kursoj estis aranĝitaj por kompletigi la devigajn bazajn konojn de la lernantoj de la elementaj lernejoj. Interesaĵo, ke la japana firmao Sharp kun devizo de la tradicio-estimo vendas kalkulilojn, kiuj enhavas kaj elektronikan kalkulilon, kaj la sorobanon.



DIVERSAJ OPINIOJ (SVISIO)

Oni faris enketadon pri la apliko de komputiloj en la instruado. Estis ricevitaj 4000 plenigitaj formularoj de la instruistoj pri matematiko el diversgradaj institucioj. Surbaze de tio estis konstatite, ke en ĉirkaŭ 65% de mezlernejoj oni aplikas komputilon, sed en bazaj lernejoj ili ankoraŭ tute maloftas. Rilate al mikroelektroniko la instruistoj de institucioj, posedantaj mikrokomputilon, havis multe pli pozitivan opinion, ol la instruistoj de lernejoj, ankoraŭ ne havantaj komputilon. 10% de la lastaj decide neis, ke la tasko kaj devo de la lernejoj estus la atentigo pri la instruadcela aplikebleco de komputiloj kaj konvene al tio la kvalifikigo kaj pluperfektigo de la instruistoj pri komputado. Sed 40% el ili senkondiĉe apogis tiun eldiron, samtempe tiu cifero eĉ la instruistoj de lernejoj, jam posedantaj mikrokomputilon estis 64%.

Ciuj membroj de la UEA konas la delegitreton. Sed ĉu vi jam vere uzis ĝin? Dum 1986 mi devis viziti Eŭropon por ĉeesti matematik-kongreson. Mi komunikis la deziron de mi kaj mia edzino, Hester, viziti aparte la oficejo de la UEA al Axel von Blottnitz, la SEA-vic-prezidanto, kiu ofte antaŭe vizitis ĝin. Ni ankaŭ menciis la grandegan koston de hoteloj pro la tiama malforteco de la Sudaŭfrika mono. Axel simple demandis: "Kial vi ne uzas la delegitreton?"

La saman vesperon mi skribis leterojn al delegitoj en la urboj, kiujn ni intencis viziti kaj en kiuj mi ne konis malmultekostajn gastejojn. Mi demandis ĉu ili konas malkarajn - mi menciis eblajn prezojn - tranoktejojn por mi kaj mia edzino.

Kia surprizo kiam ni ne nur ricevis tre afablajn respondojn, kun nomoj de eblaj hoteletoj, sed ankaŭ proponojn de helpo, kaj ne nur tiu, sed plue eĉ ankaŭ proponojn de Esperantistoj, ke ni povos tranokti en siaj domoj!

Unue ni vizitis Amsterdamon, kie ni ne restis ĉe Esperantistoj, sed de kie ni faris ekskurson al Rotterdamo nur por viziti la Centran Oficejon de la UEA. Tie mi staris longtempe kun la Plena Ilustrita Vortaro enmane, sed ĝi kostis kaj pezis tro multe por aĉeti je la komenco de longa vojaĝo. Do, finfine mi aĉetis nur kelkajn malpezajn kaj malkarajn librojn.

Forveturante el Amsterdamo survoje al Kopenhago per fervojo, Hester tre timis: Ŝia Esperanto ankoraŭ estis tre malbona kaj ŝi dubis pri la mia; dum en Kopenhago ni devis esti dormontaj ĉe Esperantistino, Tony Tiensuu. Hester eĉ timis, ke mi tute ne povos komuniki kun ŝi ino Tiensuu, ĉar en Sudaŭriko mi spertis nur la prononcon kaj lingvon de malmultaj Esperantistoj. Ŝi ankaŭ timis la renkonton ĉe la stacidomo. Ni havis ŝian adreson, sed ne sciis kiel trovi ĝin, escepte per (eble) multekosta taksio. Feliĉe ŝi skribis, ke ŝi renkontos nin ĉe la kopenhaga stacidomo.

La tuta vojaĝo al Kopenhago estis tre interesa: Aroj da bicikloj ĉe nederlanda stacidomoj, vagonaro iranta sur grandegan pramsipon, longegaj pontoj, ktp. Sed la rakontoj, kiujn ni antaŭe aŭdis pri la akurataj eŭropaj trajnoj provis esti falsaj. Ni alvenis en Kopenhago tridek minutojn post la horar-tempo. Ni serĉis iun eblan Esperantiston, sed trovis neniun. Ni demandis ĉe la informejo - sed nenio.

Finfine ni trovis ŝian telefonnumeron kaj provis telefoni. La telefono faris la plej strangajn bruojn, mi ne povis diveni kion ili signifas. Sed post duonhoru, kiam mi retelefonis, iu respondis. Mi klarigis, Esperante, kiu mi estas, kaj ŝi diris, ke ŝi ĵus alvenis hejmen de la stacidomo, kie ŝi serĉis nin. Poste ni aŭdis, ke ŝi kredis la horaron, kaj ne atendis la malfruecon de la vagonaro. Ni vere ne rajtis demandi, ke ŝi

reiru al la stacidomo, do, ni devis serĉi taksion, kaj iri tien (por R20-00). Finfine ni alvenis ĉe ŝia domo, kaj ŝi tre bonvenigis nin.

Ni sentis nin kulpaj viziti ŝin ĝuste tiam: Ŝi estis ironta al la pekina kongreso, kiun ŝi ne atendis kiam ŝi invitis nin. Ŝi nun devis akcepti nin en ŝia domo, kaj sep tagojn poste ŝi devis iri al Pekino. Sed ĉiu-okaze ni preferas sole viziti urbon kaj muzeojn, do ŝi estis libera fari siajn taskojn. Ŝi veturigis nin frumatene al nova, granda, kaj tre impona, preĝejo, kaj de tie al la urbocentro, kaj de tiam ni zorgis por ni mem. Ni aranĝis kun ŝi, ke ni reiros je la sepa al la domo de la delegito, Edith Jensen, al kiu ni originale skribis pri dormloko, kaj ŝi trovos nin tie por manĝi kune.

Post longa, varma, laciga tago en la interesa urbo, ni komencis serĉi aŭtobuson al la domo de Edith Jensen. Post longa atendo finfine ni trovis iun. Sed survoje ĝia bremsosistemo rompiĝis. Ni longe atendis la sekvantan buson. En ĝi ni vidis anglan klarigon por la ne-ofta busservo: Okazis striko de busveturigistoj. Do ni refoje alvenis malfrue ĉe niaj Esperantaj amikinoj, feliĉe nur 15 minutojn, post rapida kuro de la bushaltejo.

Tony Tiensuu prezentis nin al Edith Jensen, kiu tuj invitis nin al la manĝoĉambro. Tie, sur la tablo, staris granda botelo de biero! "Prenu, elversu," kaj ŝi donis glason al mi. Por Hester ŝi havis grandegan glason da limonado. Sed ni apenaŭ sidis kiam ŝi komencis alporti la plej bongustajn manĝaĵojn imageblajn. Ŝi donis al ni memoraĵojn kaj ŝia kuzino kunportis nin kune kun Tony al la Tivoli-ĝardenoj. Dum nia tuta vizito ili simple inundis nin per gastamo.

Je la fino de nia vizito al Kopenhago Tony prenis nin al la stacidomo, kie ni enrajnigis por Stockholmo. Kaj de la timo de Hester pri la lingvo neni restis: Ni bone komprenis unu la alian. Eĉ telefone ni povis facile interparoli!

Alveninte en Stockholmo, ni iris subtrajne al la plej proksima stacio al la domo, kiun ni okupos. Nun ni devis uzi la plej strangajn instruojn, kiujn ni ricevis letere en Sudaŭriko, kiu eble signifas ke oni fidis al Esperantistoj: "La kodo de la pordo estas 2331, kaj via ĉambro estas en la dekstra apartamento sur la unua etaĝo, la unua ĉambro dekstren. Se neni troviĝas en la apartamento, demandu la apartamentan ŝlosilon ĉe la Seven-Eleven butikoj sur la stratangulo." Feliĉe ĉarma virino, ŝi ino Gustavsonn, estis hejme, kaj ŝi malfermis la pordon, invitis nin enveni, montris al ni nian ĉambron, kaj alportis malvarman mineralakvon. Kvankam ni akiris la loĝlokon pere de UEA-delegito en Stockholmo, ni opiniis ĝin hoteleto, kaj ne sciis, ke ŝi ankaŭ estas Esperantisto.

Stockholmo tute ĉarmis nin. Konstruite sur multaj malgrandaj insuloj, ĉie oni vidas akvon. Kaj nia ĉarma dommastrino, kiel en Kopenhago, montris al ni gastamon, multe pli ol oni rajtas atendi.

Survoje al Bergen post Stockholmo ni unue vizitis kelkajn malgrandajn norvegajn vilaĝojn, restante en hoteletoj kies nomojn la delegito de Bergen, Elna Matland, sendis al ni. Alveninte en nia bergena hotelo ni ricevis mesaĝon: Ni devas telefoni al Elna Matland. Si ne estus hejme dum nia vizito, sed pro ŝanĝoj en siaj planoj, ŝi nun restis en Bergen.

Si veturigis nin per sia aŭto al la vidindaĵoj de Bergen, kaj eĉ je la deknua vespere al la apartamento de sia filino, "la tie plej alta konstruaĵo, de kie vi povas bone foti la tutan Bergen." De tie ili kunportis nin al la domo de Edvard Grieg. Pluvis preskaŭ la tutan tempon dum ni restis en Bergen - ŝajne laŭ-kutime! Sed per Elna ni vizitis grandan parton de Bergen dum unu tagmezo kaj nokto. Si eĉ iris frumatene al la haveno, de kie ni estis irontaj al Stavanger, kaj kunportis por ni esperantajn turistinformilojn.

Dum nia plua restado en Eŭropo ni ne renkontis delegitojn, ĉar ili ĉiuj ŝajnis esti en Pekino. Sed al ĉiuj vojaĝantoj al eksterlando ni rekomendas: Uzu la delegitojn! Ili deziras renkonti alilandulojn, kaj vi eble deziras renkonti ne nur vizitindaĵojn de la lando sed ankaŭ homojn. Ĝi povas esti granda kaj interesa sperto por vi kaj por ili.

Deziras korespondi

- * S-ro Dvoran Ladislav, K hajence 7651A, 391 02 SEZIMOVO USTI 11, Ĉeĥoslovakio.

Li jam estas leteramiko de Oskaro Sher, kaj skribis:

Mi petas vin pri io. Ĉu vi povus sendi al mi adresojn de belaj samideaninoj ĉirkaŭ de 25-30 jaroj, kiuj volas korespondi kun Ĉeĥoslovakioj?

Dankon.

- * S-ro Fridrich Zöld, CS-07632 BORSA 368, Ĉeĥoslovakio.

Li skribis:

Akceptu mian saluton el okazo de nia Jubilea 10-a Slovaka Esperanto Kongreso en urbo Nitra! Interesas ekscii de vi ĉu ankaŭ ĉe vi estos eldonita porokaza poŝtstampo aŭ poŝtmarko, el okazo de la Jubilea jaro de Esperanto?

Bonvolu publikigi mian koresponddeziro en via gazeto Bona Espero, mi bonpetas.

Sincere samideane salutas vin...

JUDAJ FESTOJ

Oskaro Sher

Trafoiumante BONAn ESPEROn, mi konstatis, ke la sola juda festo, kiun mi ankoraŭ ne pritraktis en ĉi tiu rubriko estas PURIM. Do malgraŭ, ke ĝi ree okazos nur la 1988-03-03an, ĉi-foje mi volas skribi pri ĝi.

La nomo de la festo signifas "lotaĵoj". Vi baldaŭ komprenos de kie venas la nomo. La festo baziĝas sur la okazaĵoj en la Malnovtestamenta libro ESTER, la sola libro de la Malnova Testamento en kiu ne aperas la nomo de Dio. La reĝo Aĥaŝeveroŝ koleris je la reĝino Vaŝti. Laŭ lia ordono ŝi estis mortigita. Poste Aĥaŝeveroŝ aranĝis belulin-konkurson por elekti novan reĝinon. Gajnis Ester, kiu ne malkaŝis, ke ŝi estas Judino. Haman, ministro de Aĥaŝeveroŝ, faris leĝon, ke ĉiu devas reverenci al li. Mordeĥaj, la onklo de Ester, ne reverencis. Kiam Haman konstatis, ke Mordeĥaj estas Judo, li akiris permeson de la reĝo mortigi la Judojn. Per lotaĵoj li elektis la 14an de la monato Adar. Laŭ peto de Mordeĥaj, Ester propetis por la Judoj ĉe la reĝo. Li ne povis nuligi la permeson jam donitan al Haman, sed donis al la Judoj permeson sindefendi. Haman kaj liaj dek filoj estis pendigitaj.

Dum Purim ni sendas donacojn unu al la alia kaj ankaŭ al malriĉuloj. Alia kutimo estas "Purim Spielers" aŭ aktoroj - oni vestas sin kiel la karakteroj en la rakonto. En la sinagogo iu voĉlegas la libron ESTER. Je ĉiu elparolo de Haman oni faras bruon por droni la nomon.

Kiel ofte ĉe judaj festoj ankaŭ Purim havas sian frandaĵon. En la Jida ĝi nomiĝas "Hamantaŝen" - "poŝoj de Haman" en la Hebrea la nomo estas "Oznej Haman" - "Oreloj de Haman". Ĝi estas triangula pasteco plenigita per la semoj de papavoj aŭ fromaĝo.

Esperanto: 1887—1987

Dr. J. H. de Klerk
Departement Wetenskaps, PU vir CHO

Die internasionale taal Esperanto is vanjaar presies honderd jaar oud. By hierdie geleentheid is dit van pas om enkele feite aangaande Esperanto deur te gee en om ook te besin oor die modigheid vir die ontwikkeling van 'n intermisionale taal en die aanleer daarvan.

ONTSTAAAN EN DOEL

Esperanto was die gedagte van die Poolse veeltalige, dr. Ludovic Zamenhof wat dit in 1887 in die Poolse hoofstad, Warschau, gepubliseer het daarvan gewerk het. Sedert sy kindertjare het Zamenhof opgemerk watter mate van spanning, haat en bloedvergieting daar geheers het tussen die mense rondom hom — en dit wens 'n gebrek aan 'n geskikte kommunikasie-medium. Net in sy geboortedorp, Bialistok, was daar nie minder nie as vier verskillende tale in gebruik.

Die doel van Esperanto was en is baie beslis nie om een wereldtaal te probeer skep nie, maar om vir mense van verskillende tale 'n tweede taal daar te stel waarin hulle met mekaar kan kommunikeer. Noem dit 'n 'brugtaal', as u so sou verkies. *Forzan*, *Basoic* of wat ook al, skep om 'n brugtaal tussen die mens en die rekenaar te vorm. Enersyds wil Esperanto langs hierdie weg 'n teenvoeter wees vir 'wereldtale' soos Engels of Russies (tale wat dikwels gekoppel is aan die uitbreidingsdrang van die mens) en andersyds wil dit tale van minderheidsgroepe

soos byvoorbeeld Basies of Wallies help beskerm.

ONTWIKKELING EN AMPTELIKE ERKENNING

Gedurende sy honderd jaar van bestaan het Esperanto van krag tot krag gegaan en ontwikkel tot op 'n vlak waar die grootste Esperanto-woordeboek, die *Plena Ilustrita Vortaro*, nie minder nie as 15 000 woorde bevat. Hieruit kan ongeveer 150 000 woorde gevorm word deur gebruik te maak van konsekwente woordvorming-reëls. Esperanto word vandag in ongeveer 100 lande — so verspreid as Japan, Brasilië, Madagaskar en Bulgarië — gebruik. Om die jare heen is 'n omvangryke literatuur in Esperanto opgebou van oorspronklike en vertaalde werke. Een van die grootste werke van Zamenhof self was die vertaling van die Ou Testament in Esperanto — die *Nuwe Testament* het eers na sy dood gevolg. Ander bekende skrywers van wie se werke in Esperanto vertaal is, is Vergilius, Shakespeare, Goethe en Tolstoi om maar net 'n paar te noem. Radio-uitsendings in Esperanto vind op 'n gereelde grondslag plaas, onder andere vanaf Switserland, Oostenryk en China. Esperanto-uitsendings van Radio Vatikaan kan byvoorbeeld hier in Suid-Afrika op Sondagaande opgevang word.

Op amptelike vlak geniet Esperanto reeds besondere aandag. Verskeie kongresse word jaarliks in Esperanto gehou en skakel onmiddellik alle ontkostes aan vertalings

uit. In 1983 is 'n Wereldkongres van Esperanto in Boedapest gehou. By hierdie geleentheid was 5 000 kongresgangers uit 50 lande teenwoordig — sonder vertalers of tolke. Heelwat reisdenste maak ook reeds van Esperanto gebruik in hul publikasies. Dit sou ook vir Suid-Afrika baie kon beteken as daar alreeds van sy inligtingsbrosjures in Esperanto was.

ONDERRIG

Aangesien Esperanto betreklik eenvoudig is om aan te leer — maar tog volgens dieselfde taalreëls as natuurlike tale funksioneer — is dit vir 'n leerling of student 'n ideale inleiding tot die studie van vreemde tale. Sels na slegs 'n paar weke se onderrig in Esperanto is dit al moontlik om eenvoudige briewe te skryf en na vlot gesprek te voer.

Oorsee word Esperanto reeds aan verskeie skole en universiteite aangebied. In Suid-Afrika kan daar aan 'n paar teknikonse reeds formele kursusse gevolg word. 'n Aantal jare gelede is daar ook deur 'n studentevereniging aan die PU vir CHO vir 'n jaar of twee Esperanto-klasse aangebied. Gedurende die eerste semester van 1987 is daar op 'n meer formele vlak 'n begin gemaak met die aanbied van Esperanto-lesings onder die beskerming van die Universiteit se Büro vir Voortgesette Onderwys. Mag die tyd spoedig kom dat Esperanto minstens op eerstejaarsvlak aan een of meer Suid-Afri-

kaanse universiteite aangebied word.

VOORDELE

Die aanleer van Esperanto het besliste voordele soos blyk uit die volgende:

Esperanto bied die geleentheid om korrespondente in feitlik enige land ter wereld te kry — en dit sluit Burkina Faso in. In tallo groot stede bestaan daar Esperanto-verenigings met wie 'n mens in aanraking kan kom tydens oorsese besoeke. Esperantiste is gewoonlik mense by wie 'n mens meer van hul lande se gebruik kan leer en terselfdertyd dit 'n ideale geleentheid om Suid-Afrika se saak te stel. Ook professionele verenigings waarin van Esperanto gebruik gemaak word, bestaan wereldwyd.

Talre Esperanto-tydskrifte word jaarliks uitgegee, waaronder die maatsydskrif *Monato*. Deur hierdie tydskrif kry mens die geleentheid om kennis te maak met mense en gebruik in die nie-Engelse wereld. Die beriggewing vind vanselfsprekend nie deur Engels plaas nie, want laat ons dit maar erken: So te se alle berigte vanuit die buiteland wat ons daagliks lees, kom via Engels na ons toe, en is in baie opsigte tog maar Engels of Amerikaans gekleur.

TEN SLOTT

Myn insiens kan Esperanto 'n groot rol in die toekoms speel en dit kan op verskeie terreine baie nuttig aangewend word. Solank Esperanto gesien word as 'n instrument om kontak en goeie mensverhoudings te bevorder, was die ontwikkeling daarvan bepaald 'noodsaaklik en kan die aanleer daarvan net die moeite werd wees. Esperanto kan sekerlik gesien word as 'n middel om harmonie en vrede te bewerkstellig, solank dit nie verhet word tot die instrument waardeur 'n utopie geskep moet word bestaande uit wereldburgers wat almal dieselfde taal praat en wat in harmonie en vrede saamleef nie.

En la oktobra numero de la influa gazeto WOORD EN DAAD aperis la jenan artikolon. WOORD EN DAAD estas la organo de la Institucio por Reformaciaj Studoj (antaŭe la Institucio por Antaŭenigo de Kalvinismo).

